GEA-anoj
POA

GISTO – APR – 2002.
VASKE, Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
VERDA KAFO = ĉiumonate, lastan Sabaton.
TUTTY'S – Independência, 30 - POA

Saluton!

Senpaga Legaĵo

PAROLKAPABLO

Ĉu vi ne flue parolas la lingvon? Mi scias la kialon. Vi ne pratikas. Ĉu vi ne havas kunulon ĉiutage ĉe vi, por paroli per nia genia hobio? – Vi neglektas kaj tio en la jaro kiam okazas la Universala Kongreso en Brazilo...tio estas troa maldiligento, konsiderante ke radio-ricevilo estas ĉipa utilaĵo, nur R$ 40,oo! La signalo de ĈRI nuntempe atingas Sudamerikon pli forte ol enlandaj stacioj...59++, laŭ telekomunika skalo. Nu, kion vi atendas? Ke koboldo sufloru al vi la ĝustan vorton, en la momento kiam vi devas diri ĝin?

VEKIĜO

Sciatas ke esperantistoj malmultnombras. Tio ne gravas, gravas ke ni estu semoj fekundaj kaj tre aktivaj, parole kaj per leteroj sur papero kiu reklamas Esperanton. Eble vi rebatas dirante, ke mankas motivo por skribi al nekonata homo. Okazas ke ofte oni trovas skribaĵon ao anoncon enhavantan nacilingvan eraro(j)n. Oni devas ne domaĝi 40-cendan afrankon por enpoŝtigi leteron al la respektiva persono. Bonvenas aserti ke oni bedaŭras ties eraron kaj ke, se li/ŝi scius Esperanton tio ne okazus, pro analizo de frazoj, ktp... – Nia misio estu tia en la aktuala mondo, kie nur pokaj homoj ne havas pupilojn el dolarsignoj. Oni pafas en mallumon, ja, sed foje trafas diligentulon kiu, pro nia averto, vekiĝas pri nia nobla celo. Ni pioĉu tiel dum ne okazas plenplenaj klasoj da entuziasmaj E-lernantoj en la tuta lando.

PAROLIGAJ EVENTOJ

Ekde la monato Majo/2002 okazos kunsidoj, ĉiam en la dua sabato de ĉiu monato, en la CHALÉ DA PRAÇA XV = Placo Kinze,far DESEAK, laŭ informas nia kara instruisto Cezar D. Soares. Ĉiu restu atenta pri kiu estos la ĉeftemo proponata, por sin prepari pri detaloj indaj je komentoj kaj babilado. Ne plu en la Publika Bazaro!

RAPORTO AL ĈRI

Signalo bela, forta, je 59++ laŭ radioamatora difino. Kelkajn tagojn, ĉefe sabate kaj dimanĉe, kelkaj radio-hobiistoj en la 40m bendo agordas sian sendilon sur ao tuj ĉe ela frekvenco 7170 Khc. La 12ª n ĉimonatan mi sendis leterojn al du plej gravaj ĵurnaloj de nia provinco, memorigante ties legantojn radioamatorojn, ke ĉiu lando havas sian regularon kaj ke ni devas respekti la punkton de la bendo,favore al la esperantista komunumo en Sudameriko,dum la duonhoro kiam ĝi okazas, por meriti respekton de ĉiuj radioaŭskultantoj. Jam troas kulpigo kontraŭ R-amatoroj, pro kirliloj, aŭtoj kaj motorcikloj kies elektra sistemo fuŝe riparita "detruas" la TV-bildojn – Mi festas la sciigon far ĈRI, ke du lernejoj oficiale instruas Esperanton en Ĉinio.Estis bone aŭdebla la intervjuo kun Osmo Buller, kaj aŭstria vizitanto. Vi bone elektis geparolistojn kun kristalklara voĉo; Via kurseto pri la ĉinaj lingvo, mi opinias, ne fruktodonis. Tute ne eblas akurate kompreni la prononcon de ĉinaj vortoj, ĉefe tial ke vi ne adoptis la internacian literumadon: Alfa,Bravo,Charli, ktp.

Gratulon pro Via Sukceso ĉe RADIO Guaiba ! Mi aŭdis ADILSON PINTON. Lerte reklamis Esperanton, nur ke, ne plene konsciis: LINGUA UNIVERSAL Tio estigas la ideon ke naciaj lingvoj ne plu ekzistos.

KIU ESTIS LA ŜOFORO?

Iam viro kaj virino perfektaj konatiĝis, enamiĝis, fianciĝis kaj geedziĝis. Ilia kunvivado estis perfekte harmonia. Dum kristnaska vespero, en ŝtormo pluvo la geo veturis sur vojo preskaŭ dezerta. Ili ekvidis ulon en malfacilegaj kondiĉoj kaj decidis helpi lin. La ulo estis la Julpaĉjo, kun enorma sakego plena de donacaĵoj. Kun la celo favori la ricevontajn infanetojn la geo proponis kunveturon al la povra oldulo. La vojo fariĝis tre aĉa kaj la geo perfekta, plus la Julpĉjo, suferis teruran akcidenton el kiu rezultis ke nur unu el la triopo postvivis. ĈU vi kapablas diri kiu el la tri estis la sola postvivanto?

Solvo: la ino, ĉar ŝi estas la nura kiu vere ekzistas.

Por virinoj ĉi "estorio"finiĝas ĉi tie. Ili ne devas daurigi la legadon

Nu bone kara leganto virseksa, tial ke ne ekzistas viro perfekta kaj Julpaĉjo estas folklora estaĵo, certe la ino veturigis kaj tio pravigas la akcidenton.

VIZITO

Iam onklino Mirna, malsana, kuŝis en hospitalo, en najbara urbo. Labor kolego proponis veturigi la nevon tien. Antaŭ ol tiu alvenis, li surmetis sian novan ĉemizon, alĝustigis la italan kravaton ĉirkaŭ la kolumo, surmetis brile ciritajn ŝuojn. Elprenis delikatan poŝtukon el komoda tirkesto, surŝutis ĝin per franca parfumo. La edzino rigardadis. Elmontrante suspektemon kaj ĵaluzon ŝi demandis:, kien vi iras? Li surmetis la palton kaj citis pravigojn. Mi vizitos la onklinon..Necesas komplezi ŝiajn parencojn Se mi aperos aĉe vestita kiel almozulo ili kulpos vin. Li krucis la brakojn kaj diris:.ĉu vi sugestas ke mi intencas trompi vin? Ne, tamen ĉu necesas surmeti vian plej modernan kostumon? Li kolere diris: Se vi havas iun dubon, akompanu min al la hospitalo. Tio estas ne bezone, ŝi diris, prenis lin ĉe la brako, kondukis lin en la dormoĉambron kaj sentencis: unue, antaŭ ol eldomiĝi vi vizitos min!

BENZINO

Tra TTT cirkuladas petskribo, ke ĉiu leganto partoprenu en kampanjo por malaltigi la prezon de benzino jene. PETROBRAS anoncis kelkajn miliardojn da lukro dum la pasinta jaro. 80% el la konsumo venas el nacia prospektorado. Kial la prezoj de ĝiaj produktoj devas esti tiom altaj? – La kampanjo rezonas: se unu entrepreno malaltigas la prezojn, la ceteraj devas akompani per malaltigitaj prezoj. Tial do ĉiu leginto plusendu la enhavon de la mesaĝo al almenaŭ dek adresoj, ke oni ne aĉetu benzinon de PETROBRAS dum ĝi ne malaltigas siajn prezojn. La prponinto kalkulas ke ene de 10 tagoj 300 mil automobolistoj estos engaĝitaj kaj la kampanjo efikos pozitive. Neaŭtomobilistoj povas/devas helpi, diskonigante la kampanjon kaj sciigante aŭtoservejojn pri la neceso malaltigi la prezojn.

TASKO

De longe ĝenas min la fakto ke, dum gravaj eventoj, ĉiuj enirejoj de la urbo havas afiŝojn, kiuj bonvenigas la partoprenantojn, en pluraj idiomoj, sed mankas la internacia vorto BONVENON. Mi esperas ke ĉiu faros ĉion eblan por aldoni sian helpon: leteri al sia urbestro kunkone al la estro de la urba konsilantaro, pledante por legxo kiu enkondukos la esprimon BONVENON en la sxildaron tiucelan. Ĉiu agu laŭ sia bontrovo, prefere kun pravigoj utilaj en reliefigo de nia neŭtrala lingvo. Se vi havas amikon municipalan Konsilanton, des pli bone. Oportune alparolu lin/ŝin. La nepoj vin benos.

BEDAURO

Ni jam atingas preskaŭ la monatfinon de Aprilo sed BRAZILA ESPERANTISTO ĝis nun ne reaperis en naĝ leterkestoj, kun sciigoj pri la UKE.. Rekte el Fortaleza ankaŭ nenio atingis nin. Ĉu vere okazos UKE en Brazilo??

MISTRAFO

Pasintan semajnon elaviadiliĝis, en la urbo Porto Alegre, du familioj afganaj, rifuĝintaj de militaj landoj. Ĉi semajno elaviadiliĝis grupo da afganaj familioj. Feliĉegaj pro la surteriĝo, ili levis la manojn al la Ĉielo kaj ĥore dankis al Alao. Ariĝis bonvenigantoj. Raportisto alkuris, por sciiĝi, kio okazas. Li demandis la fremdulojn, kio ilin ĝojigas tiome. Responde, per interpretisto, ili klarigis, ke la ĝojon kaŭzas la fakto ke ili atingis landon kie neniu pafas, ŝtelas ao murdas amase, kie ili esperas vivi pace. – La raportisto informis ilin: vi trompiĝis, vi haltis en lando erara!